

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Detlev Blanke

Irina Bokova

Mark Fettes

Ronald Glossop

Annie Grente

Mireille Grosjean

Sylvia Hämäläinen

Zsófia Kóródy

Rob Moerbeek

Radojica Petrović

Mihai Trifoi

Kristin Tytgat

Ye Peixue

Yu Jianchao





*Frاندvespero: la plej ŝatata kaj fama kutimo ĉe ILEI.
Supre: Ana Montesinos de Gomis (Britio). Malsupre: Ayelen Borgogno,
(Urugvajo). (fotoj de Mirejo Grosjean)*



Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,

Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Piona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹AdE – Akademio de Esperanto

Fotoj sur la eksteraj kovriloj

Titolpaĝe: niaj ILEI-konferencanoj en
Ateneo.

Dorskovrile supre: solena malfermo
en la Parlamenta Palaco; **malsupre:**
enirhalo de la Parlamenta Palaco, kie
okazis la Unesko-konferenco en 1954.

Karaj Legantoj,

kiel kutime la tria numero de la jar-
kolekto venas post la monatoj Julio –
Aŭgusto kaj la ĉiujara Konferenco de
ILEI. Do diversaj artikoloj priskribas
tiun gravan eventon.

Unesko ludis gravan rolon en 1954
rilate al Esperanto kaj kompreneble ni
festas kaj mencias tiun establilon abun-
de, vd. la artikolojn de M. Grosjean
(p.7., p.15.) kaj R. Glossop (p.14.)

Metante apuden Uneskon kaj Esperan-
ton ni iras tute nature al pcedukado,
rigardu la tiuteman artikolon de M.
Trifoi sur paĝoj 18-20.

Poste el Sud-Ameriko ni saltos al
Eŭropo (Zs. Kóródy, p.22), al Afriko
(A. Grente, p.26.) kaj al Azio (Yu J.,
p.31.). La Ligo agadas mondscale kaj
IPR respegulas tion. Ankaŭ artikolo
kun helpa efiko al via instruado ne
mankas (vd. M. Grosjean, p.29.)

La numeron buntigas la artikolo de D.
Blanke (p.27) reage al J. Derks (vd.
IPR 1/13, 1/14), la nova parto de la
erarologio de nia senlaca R. Moerbeek
(p.20.) kaj la prelego de K. Tytgat pri la
multlingva urbo, Bruselo.

Sur paĝoj 39-40. vi trovas la unuajn
informojn pri nia sekvajara konferenco
en Oostende (Belgio), danke al R.
Petroviĉ.

Ni deziras al vi bonan legadon!

Jozefo NÉMETH, redaktoro

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Mireille GROSJEAN: <i>ILEI solene festis en Montevideo</i>	5
Mireille GROSJEAN: <i>Paŝoj al jesa rezolucio</i>	7
<i>Rezolucio de la 47a ILEI-Konferenco</i>	9
Mark FETTES: <i>Simpozio en Montevideo esploris „lingvan justecon en praktiko”</i>	11
Ronald GLOSSOP: <i>Esperanto kaj Unesko</i>	14
<i>Parolado de S-rino Irina Bokova, Ĝen. Direktoro de Unesko (M. GROSJEAN)</i>	15
Mihai TRIFOI: <i>Esperanto – taŭga rimedo por eduki la junularon [...]</i>	18
Rob MOERBEEK: <i>Falsaj amikoj en la hispana (1-a parto)</i>	20
Zsófia KÓRÓDY: <i>Kial kaj kiom lerni en du semajnoj?</i>	22
Annie GRENTE: <i>Instruado de E-o al infanoj en la „lando de la verda stelo”</i>	26
Detlev BLANKE: <i>Kiel mezuri la gravecon de lingvo? (reago)</i>	27
Mireille GROSJEAN: <i>Kia estas bona instruisto?</i>	29
YU Jianchao: <i>E-instruado estas daŭripova en Ĉinio</i>	31
Kristin TYTGAT: <i>Bruselo: oficiale dulingva urbo, reale multlingva urbo</i>	33
<i>El la landoj kaj sekcioj (CN, FI, DE, HU)</i>	37
<i>Oostende invitas: La 48a konferenco de ILEI (Radojica PETROVIĆ)</i>	39
<i>Informoj pri ILEI</i>	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 7969 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Reprezentanto de ILEI ĉe UEA.

Vicprez.: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. <zsofia.korody@esperanto.de>. Tel./fakso hejmaj: (+49) 5521-5983. E-centroj, ekzamenoj, ALTE.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitatoj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Sekretario: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <ilei.sekretario@gmail.com> por sekretariaj aferoj, <radojica.petrovic.rs@gmail.com> alie. Tel. hejma (+381) 32 371053. Konferencoj, rilatoj kun TEJO.

Vicsekr.: Magdaléna FEJFIČOVÁ „Fejfi”, Bernoláková 25/5, SK-010 01 Žilina, Slovakio. <ilei.oficejo@gmail.com>. Membro-administrado. Rilatoj kun FEL.

Estrarano: Bharat GHIMIRE, G.P.O. Box 10518, Kathmandu, Nepalo. Tel. (+1) 620 9877. <nespa.1990@gmail.com>. Universitatoj. Komisiito por helpi al aliĝpetoj.

Estrarano: Enikő ZENGŐ SEREGHY, Dózsa u.14. 2/8, HU-4400 Nyíregyháza, Hungario. <enimyster@gmail.com>. Tel. portebla: (+ 36) 203234365.

Kalendaro, ekzamenoj, multlingva paĝaro www.ilei-mondo.info, varbado.

Estrarano: Penny VOS, Aŭstralio <penivos@yahoo.com>. Lerneja agado.

ILEI solene festis en Montevideo



Solena estis la malferma ceremonio. Danke al la klopodoj de la Loka Konferenca Komitato, sub la efika gvido de Sonia RISSO, ni povis uzi por la malfermo salonon en la „Palacio Legislativo”, la parlamenta sidejo en la ĉefurbo. Tie kunvenis la 8a Ĝenerala Konferenco de Unesko en decembro 1954, dum kiu la diplomatoj el 70 Ŝtatoj aprobis la unuan Rezolucion favoran al Esperanto. Tiu Unesko-Konferenco fakte okazis en la enirsalono de la parlamentejo.

Al ni oni donis tre belan apudan salonon kun pli ol 100 sidlokoj. Ĝi pleniĝis komplete. Do ni povis unue admiri kaj abunde foti tiun enirsalonon barokan (*vd. dorskovrile*), kaj poste sidiĝi por nia ceremonio (*vd. sube la foton de Martín MONTEVERDE, Foto-fako de Parlamento Urugvajo*).

Partoprenis en ĝi sinjorino Ana OLIVERA, urbeŝtrino de Montevideo, kaj sinjorino Lidia BRITO, direktorino de la Unesko-oficejo por sciencoj por la tuta Sud-Ameriko kaj Karibio, kaj direktorino de la Unesko-oficejo por



Argentino, Urugvajo kaj Paragvajo. Ambaŭ alparolis la publikon tre pozitive kaj amike. Kompreneble la agado de Unesko ĉu en 1954 ĉu nun ĉu estontece staris centre de niaj paroladoj, de niaj pripensoj, de niaj agadplanoj. Estas fakto, ke Esperanto kaj Unesko havas la samajn celojn kaj la samajn valorojn. Tion oni devas emfazi. Pro tio gravas, ke ni esperantistoj konu tiun tutmondan establon, kiu laboras por paco, komunikado kaj edukado. (*Vd. pliajn tekstojn pri tio en www.ilei.info.*)

En pli familia etoso ni havis nian unuan vesperon, kiu utilas al interkonatiĝo kaj kiu kiel kutime havis la ILEI-formon: franda vespero, manĝoj el ĉiuj niaj landoj. Imagu: 75 personoj el 26 landoj ion alportis kaj surtabligis. (*vd. fotojn sur p. 2.*) Sakeo kaj biero fluis en la glasojn, kukoj plej diversaj, ĉu salitaj ĉu dolĉaj, ravis nin kaj ebligis – tio estas la celo – malceremonian interparoladon inter la gekonferencanoj. En ĉiuj interkulturaj kunvenoj la plej efika vektoro por alproksimigi homojn estas gastronomio! Kelkaj junuloj el Latin-Ameriko partoprenis, helpis kaj metis viglecon en nian rondon. Ili abunde demandadis pri niaj aktivajtoj; fruktodonaj diskutoj okazis kun ili. Estontecaj fortoj aperas, feliĉiga evento!

Kompreneble ni ankaŭ laboris dum tiukonferenca semajno. La Komitato traktis abundan tagordon en pozitiva etoso; post aprobo la protokolo de tiu laboro aperos sur nia retejo. Paralele okazis diversaj kunvenoj, prelegoj, promenadoj. La lingva festivalo okazis sur placo antaŭ la konferencejo kaj altiris la atenton de vasta publiko. La nacia vespero estis abunda, kun malsamaj eroj belege prezentitaj. Tango ne povis manki, ĝi estis rava. Dum la internacia vespero la konferencanoj mem ion kantis, ion diris, iom dancis; estis okazo malkovri kapablojn de iuj personoj, kiujn oni ne povas konstati dum debatoj aŭ kunsidoj... Interese kaj amuze!

Julie vintras en la suda hemisfero. La urugvaja vintro estis tre suna kaj mezvarma aŭ mezmalvarma, la temperaturo atingis proksimume 12 ĝis 15 gradojn. Foje ventis, foje ne. La ekskursita tago estis pluva, sed nur tiu unu tago estis pluva; do ni ne povas plendi pri la vetero, tute ne. La fina tago vendredo estis ekskursita tago al Buenos Aires; unue perbuse al Colonia, pitoreska urbeto ĉemara, de kie ni, pli ol 40-persona grupo, atingis per ŝipo la argentinan ĉefurbon je la alia flanko de Rio de la Plata.

*Mireille GROSJEAN
Prez. de ILEI*

PAŜOJ AL JESA REZOLUCIO

(Mireille GROSJEAN, Julio 2014)

Unesko estis fondita en 1946.

Ĝi enhavis en 1954 72 membroŝtatojn. Unesko konsistas el Ŝtatoj kaj rilatas al Ŝtatoj. Ĉiu Ŝtato, se ĝi membras, havas ĉe Unesko delegacion el 3, 4 aŭ 5 membroj. Tiuj delegacioj obeas al sia registaro.

En 1950 petskribo pri Esperanto estas transdonata al Unuiĝintaj Nacioj (UN) kun 900 000 subskriboj privataj kaj 500 subskriboj de establoj.

UN transdonas la petskribon al Unesko.

Ne klaras, ĉu UN transdonis la petskribon al Unesko por arkivi ĝin aŭ por trakti ĝin. UEA puŝas al la dua eblo.

1952: fondo de CED „Centro de Esploro kaj Dokumentado” laŭ propono de Lapenna. Preparo de dokumentoj. Granda helpo.

Grava strategio: Lobiado = koridora agado. Esperantistoj povas kontakti la naciajn Unesko-Komisionojn pri iu propono. La nacia Unesko-Komisiono povas, se ĝi konsentas kun la propono, kontakti la registaron de sia lando. La registaro povas kompreni kaj akcepti la argumentojn transdonitajn. Tiukaze la registaro povas komisii al sia delegitaro ĉe Unesko proponi tion por enmeto en la tagordon. Poste okazas debato kaj fine ĉiuj delegacioj voĉdonas. Eble ili voĉdonos favore al tiu baza propono, eble ne. Jen la vojo por atingi ion ĉe Unesko kaj UN.

La Konferenco en Parizo en 1952 estas la 7a. La Konferenco en Montevideo en 1954 estas la 8a.

En 1952 en Parizo UEA organizas debaton inter 6 esperantistoj el diversaj landoj apud la sidejo de Unesko por pruvi, ke la lingvo efikas por diskuto kaj argumentado. Proksimume 70 delegitoj ĉeestas.



En 1952 en Parizo s-ro Lapenna proponas tekston al Unesko. La delegacio de Svislando akceptas zorgi pri la transdono. La peto iras unue de Svislando al la laborgrupo pri Kulturaj Aktivadoj. Akceptita. Poste la peto iras al la Komisiono pri la Programo. Akceptita. El tio ni komprenas, ke nun la teksto iras al la Ĝenerala Asembleo. Tiu Asembleo decidis, ke la ĝenerala Direktoro estas rajtigita komuniki al siaj membro-ŝtatoj la pet-skribon de UEA, cele al esploroj. Decido okazis dum la 8a Konferenco en 1954.

1953: UEA invitas kunlaboranton de Unesko al la 38a UK en Zagrebo (YU). Sinjoro Lebar venas.

Dum 1953 UEA laborigas la Landajn Asociojn.

1954: 39a UK en Harlema (NL). Du kunsidoj okazas pri „E-o Internacia Lingvo antaŭ Unesko”. Kongresa Rezolucio.

UEA petas statuson de NRO ĉe Unesko.

8a Konf. 2a de novembro ĝis 10a de decembro 1954 en Montevideo, Urugvajo.

Du punktoj pri E-o en la tagordo: Aprobo de nova statuso por UEA: UEA estu NRO ĉe Unesko. Trakto de la Petskribo.

Substrekas la paralelajn celoj kaj valoroj ĉe Unesko kaj ĉe E-o.

Intensa lobiado de Lapenna dum la tuta Konferenco, ĉu en koridoro, ĉu sur ŝtuparo, ĉu en restoracioj, ĉu en salonoj.... Li rilatas al delegacioj ĉefe en la franca. (Laŭ esejo de Carlo MINNAJA)

Ekspozicio pri E-o apud la Parlamenta Palaco. Inaŭguro la 17an de nov 1954 en ĉeesto de 200 personoj, inter aliaj la urbestro de Montevideo kaj la ministro pri edukado.

Negativa interveno de delegito el Danlando. Rapida traktado. Voĉdono: 3 por, 23 kontraŭ, 19 sindetenoj.

Urugvajna E-Societo publikigas artikolon pri neserioza laboro de Unesko. Ĵurnalistoj intervjuas la UEA-reprezentanton Lapenna, homoj vizitas la ekspozicion... Aperas multaj artikoloj pri tiu incidento, aŭdiĝas radioelsendoj. La tuta popolo reagis forte en la urbo. La vento turniĝas.

Pozitiva interveno de delegitino el la delegacio de Meksiko.

Lapenna obtenas kunvenon kun la gvidantoj. La gvidantoj jesas pri nova voĉdono. Rezulto de la voĉdono kadre de la Ĝenerala Asembleo: 30 jes, 5 ne, 17 sindetenoj. Vendrede, la 10an de Decembro 1954 je 17h30.

Lapenna analizas:

Pozitive: „Aprobo sekvas el celkonscio, intuicio, kapablo, jura kaj procedura kompetento.” Plie: „Hazardo, favoraj cirkonstancoj”.

Negative: Insidoj de malamikoj. Abruptaj pensoŝanĝoj. Perfiditaj promesoj. Plena ignorado. Nekompetento. Pluraj delegitoj tute ne konscias pri la ne-kontentiga aspekto de la lingva situacio. La diversaj membroj de unu delegacio ne havas la saman opinion. Membroj de delegacioj diras, ke ili ricevis instrukciojn de sia registaro. Publika voĉdono per levo de mano: pluraj delegitoj ŝanĝas sian opinion en tiu momento.

La baloto okazas sabate posttagmeze fine de streĉa semajno, en somera decembro: mankis pluraj delegitoj. Voĉdonas 52 Ŝtatoj el 72; konsekvence 20 iris promeni en la urbo....

Ĉu same ni nun iru promeni al la urbo??

(Laŭ *Esperanto en Perspektivo* de Ivo Lapenna kaj aliaj, kaj *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, red. de Carlo Minnaja)

Noto: En la Inaŭguro de la 47a Konferenco Marija JERKOVIĆ (HR) prezentis, kiel Lapenna malgraŭ malhelpadoj sukcesis influi la vojon al nova voĉdono pri Esperanto kadre de la Ĝenerala Konferenco.

REZOLUCIO

Okaze de la 60-jariĝo de la Unua Unesko-Rezolucio favora al Esperanto okazinta en Montevideo, UY, la **47a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI**, samurbe, la 24an de Julio 2014, decidas kaj konigas:

Konsiderinte la duan Rezolucion de Unesko en 1985 en Sofio, BG, kiu emfazas la atingojn de Esperanto,

Konsiderinte, ke Esperanto aperas sur le retejo de Unesko apud la ses laborlingvoj de Unesko kaj la bulgara por prezenti la paroladon de la

Ĝenerala Direktoro s-rino Irina BOKOVA por la Tago de la Patrino Lingvo je la 21a de Februaro 2014.

Konsiderante la paralelecon de la celoj de Esperanto kaj Unesko kaj la similecon de la alstrebataj valoroj kiel respekto, solidareco, toleremo,

ILEI rekomendas al Unesko

- noti la gravecon de la egalrajtiga, diskriminaci-malhela rolo de la Esperanto-instruado por pacedukado, en kiu la instruistoj praktikas ankaŭ utiligon de Esperantlingva porpaca literaturo (la serio Oriento-Okcidento atingis kvindekda titoloj ne nur el Eŭropo kaj Azio sed ankaŭ el Afriko kaj Sud-Ameriko), konsciigon pri diferencaj popolsintenoj, kulminaj en konfliktsituacioj; ili praktikas konfliktsolvadon, sed ankaŭ la utiligon de verkoj rilataj al Unesko mem kaj la Homaj Rajtoj, kiel la „Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj”, „Paĉjo, kio estas rasismo?” „Kio estas demokratio?” kaj de multaj aliaj.
- plu subteni tiun agadon de Esperanto-instruantoj.

ILEI volas

Rekomendi al siaj sekcioj esplori pri la konsisto de sia nacia Unesko-Komisiono kaj ekrilati kun ĝi;

Provi prezenti Esperanton al tiu instanco kaj krei daŭripovajn ligojn kun ĝi ekzemple per aliĝo;

Rekomendi al siaj sekcioj konigi al siaj membroj la laboron de Unesko kaj ĝiajn celojn kaj valorojn;

Rekomendi al siaj sekcioj partopreni en la agadoj de Unesko laŭ siaj ebloj kaj laŭ la lokaj cirkonstancoj, ekzemple per kunlaboro por atingi la jarmilajn celojn de Unuiĝintaj Nacioj;

Ek rilati kun la ĉefa sidejo de Unesko en Parizo cele al depono de kandidatiĝdosiero por fariĝi Ne-Registara Organizo de tiu establo;

Partopreni en plej multe da laborkunsidoj en Parizo kaj eventuale en aliaj lokoj de la mondo sendante reprezentantojn laŭ la ebloj;

Sendi al Unesko agadraportojn kaj atestojn pri samcelaj aktivaĵoj;

Sendi al Unesko regule la du revuojn de ILEI: *Internacia Pedagogia Revuo* kaj *Juna Amiko*;

Peti aŭspiciojn de la nacia Unesko-Komisiono por la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto en Svislando kaj por ĉiuj ĉiujaraj Konferencoj kaj inviti tiun instancon al la malferma ceremonio de tiuj okazaĵoj.

Utiligi en ĉiunivelaj kursoj materialojn pacedukajn, kulturdiskonigajn kaj sciencopopularigajn. Kunlabore kun UEA vastigi la konojn pri la tuta mondo per verkoj en Esperanto, interalie per la serio *Oriento-Okcidento*, nome per individuaj aŭ grupaj retradukoj aŭ almenaŭ resumoj de elstaraj eldonaĵoj rekomendataj de Unesko.

Helpi kompili bazan normliston de pacedukaj verkoj konendaj en Esperanto-ekzamenoj, kaj ĝin utiligi en la instruado.

Helpi al Esperanto-instruantoj en malfavoraj cirkonstancoj akiri tiucelajn materialojn.

Simpozio en Montevideo esploris „lingvan justecon en praktiko”

Lingva diskriminacio, la sorto de minoritataj lingvoj, la utiligo de la reto por subteni indiĝenajn lingvojn, kaj lastatempaj iniciatoj por plivastigi la



kapablon legi kaj skribi en latinamerikaj landoj – jen kelkaj el la temoj traktitaj en unutaga Esperantlingva simpozio en Montevideo, Urugvajo, la 24-an de julio 2014. La aranĝo okazis kadre de la 47a Konferenco de ILEI, kaj origine celis allogi hispanlingvajn fakulojn el la proksimaj universitatoj, kiel sugestas la temo: „Lingva justeco en praktiko: Latinamerikaj spertoj kaj tendencoj.” En la fino, tamen, ĉiuj kontribuantoj parolis E-on – kio ne malhelpis la nivelon de la kontribuoj, el kiuj pluraj estis elstare interesaj.

La simpozion malfermis d-ro Mark FETTES, la prezidanto de UEA, per kelkaj bonvenigaj vortoj (vd. *la foton sur p. 11*). Laŭ li, la simpozio estos “okazo pensi kune pri tre ampleksa kaj kompleksa demandaro” el la diversaj vidpunktoj de esperantistoj kaj latinamerikanoj; „ĝi estas do perfekta maniero inaŭguri jaron, kiu markos la 60jariĝon de nia kunlaboro kun Unesko.” Post li la podion prenis d-ro Duncan CHARTERS, usona profesoro kun vasta sperto pri lingvoinstruado kaj interkultura edukado en hispanlingvaj kunteksto. Rapide kaj lerte li skizis kvin aspektojn de lingva diskriminacio en Latinameriko, ekde la konataj problemoj de indiĝenaj



lingvoj ĝis la malpli konata movado por eduki ĉiujn latinamerikanojn al pasiva kompreno de la „alia” lingvo – la hispana por portugallingvanoj, la portugala por hispanlingvanoj. Ne mankis kritika rigardo al la diskriminaciaj efikoj de la angla lingvo, kiu restas malmulte uzata en la kontinento kaj ofte funkcias ekskludige en sciencaj konferencoj.

Urugvajano, s-ro Eduardo TRÁPANI (vd. *maldekstre, fotis Marija Beloŝeviĉ*), vikle kaj konvinke rakontis pri la iniciatoj de la retroprograma projekto *Mozilla*, kun kiu li kunlaboras jam dekon da jaroj por esperantigo de ĝiaj produktoj. Laŭ li, la nova sukceso de la projekto, krei rete bazitan poŝtelefono sistemon por tre malmultekostaj aparatoj, faros grandan kontribuon al la disponigo de interretaj rimedoj al la indiĝenaj popoloj de Latinameriko. Pri indiĝenaj popoloj parolis interalie ankaŭ s-ino Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ (vd. *dekstre*), kunlaboranto de Radio Havano kaj sperta instruisto, kiam ŝi rakontis pri la vasta efikeco de „Mi ja povas!”, instruprograme el Kubo por baza alfabetigo, kiu atingis jam tri milionojn da latinamerikanoj, ne nur en la hispana sed ankaŭ en pluraj indiĝenaj lingvoj.



La parolon reprenis d-ro Fettes por disvolvi argumenton bazitan sur liaj esploroj kiel profesoro pri edukado en la kanada universitato *Simon Fraser*.

Ekirante de konsideroj pri lingva justeco en Kanado, li prilumis la profundan kaj subtilan influon de „ŝtato-centra pensado” en niaj konceptoj de lingvo kaj justeco, kaj venis en la fino al la funkciado de Esperanto kiel „kosmopolita propedeŭtiko” – t.e. kiel rimedo, kiu „helpas trejni la vidkapablon kaj la imagkapablon” per la sperto de komunikado „neŭtrale homa.”

Necesis iom da matematikaj konoj por sekvi la prelegon de d-ro Bengt-Arne WICKSTRÖM, el Humboldt-Universitato, Berlino, pri „La daŭra travivebleco de minoritataj lingvoj en la moderna mondo.” Li prezentis simplan sed tre pensinstigan modelon de lingvo-elektado, lingvo-lernado kaj lingvo-transdono, kiu montris, ke minoritata lingvo povas stabile pluvivi, nur se sufiĉaj familioj, en kiuj unu el la gepatroj estas „grand-lingvano,” konscie elektas kultivi dulingvecon ĉe siaj infanoj.

La urugvaja d-rino Sandra BURGUES ROCA, en vigla kaj riĉe ilustrita prelego, skizis la ŝanĝiĝantan rolon de diversaj lingvoj en „la transmisio de la medicina kono tra la historio,” finante per la konstato, ke relative novaj esploroj konvinke montras la pozitivan efikon de lingvolernado al la cerba sano. Kontraste, la lingvopolitikaj esploroj pri Eŭropa Unio de d-ro Michele GAZZOLA reliefigis la *mankon* de lingvokonoj ĉe multaj eŭropaj civitanoj, aparte ĉe la plej malriĉaj sociaj tavoloj. El tio li konkludis, ke ĉiuj proponoj forlasi la oficialan multlingvismon de EU por alternativa sistemo, kun unu ĝis tri oficialaj lingvoj (el la angla, franca kaj germana), estas neeviteble diskriminaciaj kaj ekskludemaj.

Post aktiviga kaj amuza dumpaŭza prezento de „erarologio” de s-ro Rob MOERBEEK, la simpozio finiĝis per simpla kaj elokventa prezento de s-ro Ismael ÁVILA el Brazilo pri sia laboro por enretigi la faman rektmetodan kurson *Saluton!* de Audrey CHILDS-MEE. Ĉar ĝi estas alirebla por ĉiuj, sendepende de la lingvo de la uzantoj, la kurso celas esti paŝo al pli justa kaj egaleca aliro al E-lernmaterialoj por ĉiuj retanoj.


Tra la tuta simpozio, publiko el ĉ. 30 homoj atente sekvis, faris bonajn demandojn, kaj ĝenerale montris sian aprezon por la kvalito kaj vario de la programo. Taŭgaj eroj el la diversaj prezentoj aperos en *Internacia Pedagogia Revuo*.

Raportas: Mark FETTES,
<mtfettes@sfu.ca>

Esperanto kaj Unesko

(por UK en Bonaero, 2014 Julio 29)

Ronald J. GLOSSOP, Profesoro Emerita, Sud-Iliojisa Universitato en Eduardsvilo, Usono, <rglossop@mindspring.com>



Kiam esperantistoj pensas pri la interago inter Esperanto kaj Unesko ili kutime pensas pri la gravaj rezolucioj adoptitaj de Unesko en 1954 kaj 1985. Sendube tiuj rezolucioj estis grandaj sukcesoj por Esperanto. Ni notu kelkajn detalojn.

La rezolucio de 1954 adoptita en Montevideo, Urugvajo, diras ke Unesko notas la rezultojn atingitajn de Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo kaj rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko. Plue Unesko komisiis la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo kaj tiucele kunlabori kun la Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

La rezolucio de 1985 adoptita en Sofia, Bulgario, diras, ke Unesko rekonas, ke dum la periodo post 1954 Esperanto faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj kaj la plimulton de la homaj agadoj kaj rekonante la grandajn eblojn kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado de malsamaj naciecoj kaj okaze de ĝia centjara datreveno petas la Ĝeneralan Direktoron sekvi la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj kaj invitas la Membro-Ŝtatojn marki taŭgajn aranĝojn, deklarojn kaj eldoni specialajn poŝtmarkojn kaj simile kaj instigi al la enkonduko de stud-programo pri la lingva problemo kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj institucioj por pli alta edukado. Tamen ni devus memori, ke ekzistas multaj aliaj gravaj interagoj inter Esperanto kaj Unesko. Unu grava afero estas la mesaĝoj kiujn UEA ofte ricevas de la Ĝenerala Direktoro de Unesko okaze de la Universalaj Kongresoj. Ekzemple mi bone memoras, ke la UK ricevis salut-mesaĝojn de Amadou-Mahtar M'BOW kiam li estis Ĝenerala

Direktoro de la jaro 1977 ĝis 1986, tio estas, unu jaro post la la adopto de la grava rezolucio.

Ankaŭ la nuna situacio estas tre bona. S-rino Irina BOKOVA, la nuna Ĝenerala Direktoro de Unesko, sendis salut-mesaĝojn al la UK en 2011 en Kopenhago kaj ankaŭ al la UK en 2013 en Rejkjaviko. Parto de tiu lastjara mesaĝo diris, „Ekde sia fondo antaŭ pli ol cent jaroj, la Esperanto-movado estas aliancano kaj amiko al la tuta sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj aparte al Unesko. Kune, laŭ la mandato de Unesko, ni laboras por pligrandigi la manierojn de komunikado inter popoloj kaj uzas ilin por la celo de reciproka interkompreno.”

Plue s-rino Bokova faris aliajn deklarojn kiuj harmonias kun niaj komunaj celoj. Ekzemple la 21-an de Februaro 2014 en sia mesaĝo por la Tago de la Gepatra Lingvo ŝi diris: „Samtempe, la alproksimiĝo de popoloj en 'monda vilaĝo' eĉ pli necesigas la strebadojn por interkulturaj kompreno kaj dialogo. En la hodiaŭa mondo la normo estas la uzo de minimume tri lingvoj, unu loka, unu pli vaste uzata, kaj unu internacia lingvo por komuniki sur niveloj loka kaj tutmonda.” Ĉi tiu mesaĝo de s-rino Bokova aperis en la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, plus du aliaj lingvoj, ŝia propra patrino lingvo, la bulgara, kaj la Internacia Lingvo Esperanto! Pensu pri tio. La speciala deklaro de la Ĝenerala Direktoro de Unesko aperis en Esperanto kune kun aliaj lingvoj.

Ŝajnas al mi, ke denove nun ekzistas tre bona rilato inter Esperanto kaj Unesko.

Parolado de S-rino Irina BOKOVA, Ĝenerala Direktoro de Unesko

okaze de la investada ceremonio por inaŭguri ŝian duan mandaton kiel Ĝenerala Direktoro de Unesko, la 18an de Novembro 2013.

(Eltiraĵoj elektitaj de Mirejo GROSJEAN, kiu ĉeestis tiun eventon en la pariza sidejo de Unesko.)

S-ino Bokova parolis pri Unesko. Anstataŭigu Uneskon per Esperanto. Ĉu estas diferenco? S-ino Bokova parolis sinsekve en fr, ru, es, en (eble en alia vico). Tradukis el la franca al E-o Jean-Pierre DUCLOYER.

Altestimataj Gesinjoroj

(...)

Mi staras antaŭ vi, pli inspirite ol iam de nia samvidmaniero. La vidmaniero pri mondo de homaj rajtoj kaj de digno. La vidmaniero pri homaro kiel unu sola komunumo. La vidmaniero pri multflanka ordo pli nedifektebla, pri pli forta UN. Mi min devontigas senhalte labori por antaŭenigi la aferon.



(...)

Tio estas la ideo pri humanismo esprimita per la spirito de „Ubuntu”, „homa grandanimeco” en la bantua socio, de Konfuceo, de la hinda humanisto Swami Vivekananda en la 19-a jarcento kaj de tiom pli da saĝuloj.

(...)

Ĉiu el ni estas malsimila, sed ni ne vivas solaj, ni vivas kune, kaj ĉiu el ni enkorpiĝas la tutan homaron.

(...)

En tiu aliĝanta mondo ni nepre restu fidelaj al la principoj, kiuj fondis humanismon:

- la homa digno, kiun la itala filozofo Pico della Mirandola vidis en tiu kapablo de la homo difini sin mem, plene realigi sian idealon...
- la principo pri egaleco kaj justeco...
- solidareco

Ni devas vivi tiujn principojn en la 21a jarcento kaj ilin adapti al la nuntempaj defioj.

(...)

Tia estas mia vidmaniero pri nova humanismo.

Unue, homa digno estas intime ligita kun homa evoluo, kun batalo kontraŭ malriĉeco. Kaj homa evoluo havas sencon, tion ni nun komprenas, nur se ĝi estas daŭra. Ĝi efikas kontraŭ si mem, se ĝi okazas malfavore al la planedo. Ĝi efikas kontraŭ si mem se ĝi okazas ne favore al ĉiuj.

(...)

Fine, humanismo estas solidareco, certeco aparteni al unu sola homa familio.

En tiu ĉi nuntempa diverseca erao tiu solidareco devas preni la formon de nova mondĉivitaneco.

Tutmondiĝo, urbanizado, kultura diverseco desegnas multkulturajn sociojn kun multaj identecoj.

Tiu diverseco devigas nin rekonsideri evoluon, dialogon, toleremon, socian koherecon, kaj eĉ pacon.

La limoj de paco moviĝas ene de la socioj depende de ĉies percepto pri sia kulturo kaj pri aliula kulturo.

Por repaciĝi kun aliuloj, necesas esti en paco kun si mem, kun multaj anecoj kaj vundaj memoraĵoj, kiuj postulas respekton.

Tiu riĉeco estas ankaŭ kreiva trezoro por renovigi ideojn, se ni lernas sammove akordigi la riĉigan diversecon kun la kunigaj homaj rajtoj.

Unesko plenumas senkomparan rolon por proponi lernprogramojn kaj kompetentecojn, kiuj ebligas al civitanoj kunvivi malgraŭ malsimilaj kulturoj, malsimilaj lingvoj, kaj estigi kulturajn sinergiojn.

Nia rolo estas doni ilojn, por ke tiu diverseco fariĝu dialogforto kaj interkompreniĝ-forto por alfronti altajn defiojn.

Efektive, necesas kune vivi kaj labori: klimatoŝanĝiĝo, naturaj riskoj ne konas landolimojn.

Mastrumado de akvo, biodiverseco ne konas landolimojn.

Scienco ne konas landolimojn.

Necesas krei spacojn, pensmanierojn, kompetentecojn por akcepti tiujn defiojn malgraŭ niaj malsimilaj kulturoj, kredoj kaj devenoj.

Nia universala deklaro pri kultura diverseco estas vortaro pri tiu tutmondiĝo, manlibro pri ĉivitaneco por multkulturaj socioj.

Kaj pli ol iam, ni konscias pri la graveco de la esprimo de Prezidento Houphouët-Boigny: „Paco ne estas vorto, paco estas agmaniero, kompetenteco.”

Edukado devas esti instruado pri la multkulturaj valoroj kaj kompetentecoj necesaj en la 21-a jarcento, por inici gejunulojn pri tutmonda ĉivitaneco, kaj tio estas la tria piliero de la iniciato „Ĉefe Edukado” lanĉita de la Ĝenerala Sekretario de UN kaj gvidata de Unesko. Mi repensas emocie pri la revo de Doris LESSING, Nobel-Premiito pri literaturo, kiu forlasis nin hieraŭ, kaj kiu batalis dumvive kontraŭ „fragmentiga kulturo”, en kiu

gejunuloj, kiuj ĝuis studjarojn, scipovas multon en nur unu aŭ alia fako kaj nenion scias pri la mondaj realaĵoj, nekapablaj pensi tutmonde.

Mi citas ŝin:

„Ni posedas minejon – trezoron. Ĉio estas ĉi tie, tiu literatura abundeco preta esti senĉese ree malkovrita de iu ajn, kiu bonŝance ĝin trafas...

Supoze, ke nia mondo estos ruinigita pro milito. Supoze, ke inundegoj superakvos niajn urbojn, ke la marnivelo altiĝos.

Ĉiam la rakontisto estos ĉi tie, ĉar nin modlas niaj imagaroj, ili ebligas al ni la vivon, ili kreas nin. Mense refreŝigas – rekonstruas – nin niaj rakontoj, kiam ni estas ŝiritaj, vunditaj, eĉ neniigitaj. Estas la rakontisto, la revfaranto, la mitfaranto kiu estas nia fenikso: la rakontisto montras nin en nia plej granda kapablo kaj en nia plej efika kreiveco”.

Unesko estas tiu tipa universala platformo, la ideolaboratorio, la reto unika por ke tiu heredaĵo vivu, por malapartigi la fakojn, por instrui kiel agi kun aliuloj kaj kiel senĉese nin ŝanĝi.

(...)

El la salutmesaĝo de Irina BOKOVA al la UK 2011.

Vi (esperantistoj) kontribuas al kuraĝigo de idealoj pri paco, libereco, progreso kaj solidareco.

Ili nepras por fortigi la junularon kaj atingi la jarmilajn celojn por la evoluo de la tuta mondo.

Esperanto – taŭga rimedo por eduki la junularon en la spirito de la paco kaj kunlaborado

(por ILEI-programo dum la UK en Bonaero, 29 Julio 2014)

Mihai TRIFOI, emerita instruisto, Rumanio, <mihaitrifoi@yahoo.com>

La statistikoj anoncas, ke dum la lastaj 5000 jaroj la mondo travivis 292 jarojn de vera paco, ke en tiu ĉi periodo okazis pli ol 14 500 militoj, grandaj kaj malgrandaj, sur la tuta planedo, dum kiuj mortis milionoj kaj milionoj da homoj.



Sed kiu statistiko povus enhavi la nemezureblajn perdojn de materiaj kaj spiritaj valoroj, la neimageblajn hororojn kaj suferojn, kiuj mutilis la vizaĝon de nia tero?!

Ankoraŭ ne estingiĝis bone la fina kaj funebra gongo de la plej granda monda konflikto kaj la mondo sin preparas por nova detrua milito. En ĉi tia mondo, en kiu kelkaj Ŝtatoj uzas la plej novajn konkerojn de la scienco kaj tekniko por la perfektigo de la detruaj rimedoj, en mondo, en kiu la armilaj stokoj fariĝis tiel grandaj, ke ili povus detruigi plurfoje, la pacon oni devas konstrui kaj

defendi. Oni devas ĝin lerni!

En tiu ĉi kunteksto necesas strebi firme eduki la homojn, kaj unue la gejunulojn en la spirito de l' paco kaj kunlaborado. La PACO, ĉi tiu nobla kaj justa aspiro de ĉiuj popoloj, estas garantio por pli bona vivo por la homaro. Ĝin oni devas instrui kaj lerni, ĉar nur en senmilita mondo la junaj generacioj povos koncentri la fortojn por la konstruo de estonto pli bona kaj pli justa sur nia planedo.

Ni opinias, ke la lernejo, kiel la ĉefa edukfaktoro de la junularo, per bone pensitaj agoj kadre de diversaj organizoj kaj lernejoj projektoj, povas kaj devas disvastigi en la junularajn societojn la idealojn de l' paco, interkompreniĝo kaj amikema kunlaboro. Nur konsciigante la junularon pri la danĝero de la milito kaj pri la neceso de lukto por ĝia forigo, ni povas sekurigi plusan ŝancon al paco, kies simbolo estas la bela blanka kolombo. Sed malmultaj gejunuloj konas hodiaŭ kiel naskiĝis tio.

Ni opinias, ke ĉiu infano kaj ĉiu junulo devus koni la faman pentraĵon de Pablo PICASSO pri la blanka kolombo kiel simbolo de l' PACO, kaj ĝian historian, kiun ankaŭ mi legis iam kun granda intereso.

„Estis en Aŭgusto 1940. La nazioj okupis Parizon. Multaj loĝantoj forlasis la urbon; aliaj restis por batali kontraŭ la invadantoj. La konata artisto Pablo PICASSO estis inter tiuj, kiuj restis inter la muroj de Parizo por konfronti kun la invadantaj malamikoj.

Iutage vizitis lin maljunulo, kiu rakontis al li pri sia granda malfeliĉo. Lia nepeto Lucien ŝatis igi la kolombojn flugi. Post la alveno de la faŝistoj Lucien ne plu flugigis la kolombojn per naztuko. Tiucele nun li uzis peceton de ruĝa flago fiksita al longa bastono. Kiam unu el la hitleraj pafistoj ekvidis lin kun la ruĝa flago en la mano, li tuj mortpafis la knabeton. Lucien falis en sanga flako. Pro la bruo de la pafado la kolomboj forflugis timigitaj. Apud la pafita knabo restis nur unu kolombo, blanka kaj bela. Al la germana soldato ŝajnis, ke li ne faris ĉion. Li kaptis la kolombon kaj fluigis ankaŭ la sangon de la senkulpa birdo.

La maljunulo petis la grandan artiston pentri per saĝaj okuloj tiun birdon, por ke tiu pentraĵo restu je la memoro de la knabo. Picasso pentris neĝblankan kolombon gajplenan kiel estas la Vivo, la Libereco kaj la Paco. Dek jarojn poste, dum la Monda Kongreso de la Paco en Parizo, Picasso pentris denove la kolombon, kaj hodiaŭ la tuta homaro dankas al li por ĉi tiu simbolpentraĵo”.

Sed dolore ni konstatas, ke ankaŭ en la nuna tempo multaj homoj, pro malsufiĉa morala kaj spirita evoluo, nenion lernis el la malfeliĉaj okazintaĵoj de la pasinteco, kaj ĉie sur nia planedo la mortiga principo daŭre faras viktimojn. Ĝuste pro tio unu el la taskoj de la edukistoj estas eduki la infanojn kaj la gejunulojn en la spirito de la paco kaj de la amo por siaj proksimuloj.

Falsaj amikoj en la hispana. Gardu vin antaŭ duonamikoj!

Hispanlingvuloj facile lernas Esperanton, en rekorda tempo pro la simileco de la vortprovizo. Tamen embuskas amaso da 'falsaj amikoj' kaj ofte la hispana havas esprimon komunan por diversaj Esperanto-konceptoj (polisemio).

Plej frapas la uzado de al-objekto persona, kie Esperanto uzas rektan objekton: 'ni invitas al vi': ni vane atendus KIUN oni invitas al nia adreso.



Sed jen la unua parto de la listo prezentita en la Tago de Kapabligo de la Bonaera UK. Parto jam antaŭe estis traktita, sed ripeto ne malutilas.

- | | |
|-----------------------------|---|
| 1. Absorba papero | sorba papero (absorbi rilatas mensan okupon) |
| 2. Eta, sed adulta | (adulta: hispane: adultero: malfidela {pp. edzo}) |
| 3. animala parko | besta ĝardeno: animal= animalo aŭ besto, stultulo. |
| 4. arbitra decido | arbitracia (arbitro= arbitracianto; arbitra= senskrupula) |
| 5. troa artikolo | (articulo= artikolo aŭ artiklo, varo) |
| 6. asisti kunvenon | asistar= asisti aŭ ĉeesti |
| 7. atenti al la reĝo | atentar= atenci (iun); atender= atenti iun/al iu |
| 8. kuglo lin atingis | fr. atteindre, es. atinar: trafi |
| 9. bando de la registaro | bando= proklamo, edikto, dekreto |
| 10. fera bastardo | fajlilo! |
| 11. ŝi estu bendita | benata (komparu: Benedikto) |
| 12. borda dormloko | borda= kabano |
| 13. loko borde | surŝipe |
| 14. serĉi kargon | cargo= kargo, ŝarĝo, laborposteno. |
| 15. ne cenzuru ĉiujn | censurar= kritiki, riproĉi (reprochar) |
| 16. ne ĉiam demandu | demandi= plendi; demandi= preguntar |
| 17. kien ni derivas? | derivar= devii; derivi estas transitiva verbo. |
| 18. la direkta vojo | rekta |
| 19. malbona efekto | efiko |
| 20. nia ekipo venkis | teamo |
| 21. faru ekonomiojn | ŝparu |
| 22. serĉi jaron en stablo | ĉevalidon/ĉevalaçon en stalo |
| 23. mi eksperimentis nenion | spertis/sentis/suferis |
| 24. en eminenta loko | elstara loko |
| 25. estimi iun senvalora | (enantiozo!) juĝi/taksi... |

26. ĉu vi legis la fabulon?	fablon (fabelo= cuento)
27. belan faldon vi havas	jupon
28. trinku ni ĉefonde	fonda: gastejo; latinamerika: drinkejo
29. alta faro	lumturo (la 7a mondmiraklo: la „Pharos” de Aleksandrio)
30. fasto festo!	fasto= feliĉa
31. ne feriu kun mafianoj!	feriar: ferii, komerci
32. domo kun mizera figuro	figura: figuro, formo, aspekto
33. mi flaras flaton	flato= gaso, flatulenco
34. Fraj Petro	fray= frat(ul)o
35. tro granda gasto	gasto= kosto
36. generala striko	generala= general-edzino; general= generalo; ĝenerala
37. laŭdinda gesto	gesto= gesto, grimaco, faro (ĝesto)
38. brua gimnasio	gimnasio= gimnastikejo; gimnazio: colegio
39. glaso por la floroj	vaso= vazo, glaso (jarrón florera)
40. atentu la gradon	grada= ŝtupo; grado= grado.
41. sengrana pano	grano= greno, grajno
42. bona grenado	granado= granato (frukto)/grenado (armilo)
43. nur por homoj	hombre= homo; viro (fr.: homme)
44. humana korpo	humano= homa; humana
45. ĉu vi ignoras la lecionon?	ignorar= ne scii; ignori

Reagoj bonvenas! (*daŭrigota*)

Rob MOERBEEK, Nederlando, moerbeekr@gmail.com

Kial kaj kiom lerni en du semajnoj?

*Resuma analizo pri SEP – Somera Esperanto-Perfektigo, novtipa
dusemajna intensa kursaro en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo*

Novan kursproponon povis ĝui la partoprenantoj en tiu internacia somera renkontiĝo organizita de Interkultura Centro Herzberg (ICH) inter 19 – 26 Julio respektive 27 Julio – 02 Aŭgusto 2014. La celo estis doni al la

kursanoj plenan mergiĝeblon en Esperanto-lernadon, helpi al tiuj, kiuj havas en somero pli da tempo por lingvolernado kaj povas pli bone, pli profunde ellerni la lingvon dediĉante 1-2-semajnan periodon al intensa okupiĝo pri Esperanto, al tuttaga praktika uzado de la lernitaĵoj, interkompreniĝante unu kun la aliaj en la lernita cellingvo.

Studrondoj

La grupoj estis ne tro grandaj, ĉ. 10-personaj kaj ili laboris paralele, apartigite laŭ nivelo: komencintoj kaj progresintoj sub gvido de spertaj instruistoj (Zsófia KÓRÓDY kaj Peter ZILVAR). Ni spertis, ke la komencantoj en kelkaj horoj atingis la nivelon de la komencintoj kaj eblis poste kune, en bona harmonio kunordigi ilian kunlernadon eluzante la jamajn sciojn de tiuj, kiuj iam lernis iom da Esperanto kaj engaĝi ilin en la instruadon, 'ekflugigon' de la nul-sciantoj. La komencintoj ĝuis esti modeloj, ekz. por lerni bazajn fonetikon kaj gramatikon, kaj la komencantoj volonte lernis de ili kaj tiel la instruado fariĝis tuja komunikado kaj ne unudirekta (de la instruisto venanta) informfluo. Dekomence ili estis instruitaj nur en Esperanto, per rekta (Cseh-) metodo kaj ricevis klarigojn en la germana (aŭ escepte en la hungara aŭ en la angla) nur se estis nepra bezono.

La membroj de la grupo de progresintoj havis la avantaĝon tuj komunikadi kun eksterlandanoj (ekz. el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥio, Hungario), povis rapide refreŝigi siajn konojn kaj al kutimiĝis al tuja kaj tuttage nura uzado de Esperanto. Ili ricevis pensigajn kaj malfacilajn taskojn, devis ofte labori en paroj aŭ etaj grupoj, solvi situaciajn ludojn ktp. kaj estis instigitaj kaj kontrolataj de la kursgvidantoj por eviti krokodiladon.

La organiza strukturo

La intensa lernado okazis dum du semajnoj, pluraj partoprenis en ambaŭ semajnoj, kelkaj nur en la unua, aliaj nur en la dua parto. La lernado daŭris tuttage, la kursanoj tranoktis en luitaj apartamentoj kaj en hoteloj en Herzberg kaj pasigis la tutan tagon en la Esperanto-Centro, kie estis bonaj laborkondiĉoj.

Al la antaŭtagmezaj 5x45-minutaj studhoroj aldoniĝis lingvoekzercado, interparolado dum paŭzoj kaj manĝoj, dum posttagmezaj programeroj kaj libertempaj aktivajtoj. La grupgvidantoj bone interagis, foje-foje ŝanĝis gvidrolojn, por ke la lernantoj aŭdu ankaŭ alian prononcmanon, spertu

alistilan instruadon, ja dum 1-2 semajnoj oni bezonas variajn aktivaĵojn por eviti ripetadon kaj monotonecon. Post la vespermanĝo la kursanoj denove kolektiĝis por libera kunestado, vespera babilado kaj tiel estis atingeble, ke la tuttaga lingvouzo ŝanĝu por ili Esperanton de klasĉambra fako al komunikilo bezonata por ĉiutagaĵoj.

La enhavo

La komencintoj – post senlibra, Cseh-metoda enkonduka parto – sekvis la lecionojn de la rektmetoda lernolibro de Stano MARČEK. Tio certigis, ke ili havis komunan bazan materialon por lerni la lingvon paŝon post paŝo, ekzerci bazajn gramatikajn strukturojn, ekhavi la bezonatan vortprovizon por tuja dumtaga uzado kun aliaj kursanoj. Interesa kontrasto al tiu sistema lernado kaj granda defio por la komencintoj estis la ekuzo de lernitaĵoj en la praktiko, ja ili en la paŭzoj kaj dum la manĝado kunestis kun la progresintoj kaj estis motivitaj konversacii kun ili kaj esti parto de la parolkomunumo. Estis interese sekvi ilian strebadon provi kompreni, pri kio temas en la diverstemaj paroladoj kaj provi esprimi siajn pensojn kaj sentojn.

La progresintoj ne lernis el lernolibro sed ricevis taskfoliojn, legomaterialojn, informojn por situaciaj ludoj, gramatikajn ekzercojn, testseriojn ktp. La ĉefa celo dum la unua semajno estis la plibonigo de ilia parolkapablo, plilarĝigo de la vortprovizo kaj traktado de gramatikaj problemoj. La kursanojn aparte ĝojigis, ke inter la instruhelpiloj estas ekz. domenludo, kartaroj, memorludo, bildoj kaj bildvortaroj, paroliga tabloludo, koloraj broŝuroj ktp., kiuj vekis la intereson kaj certigis agrablan amuzadon dum ŝvitiga tasksolvado. Al la tuttaga okupiĝo pri Esperanto apartenis ankaŭ solvado de hejmtaskoj kaj verkado de rakontoj, eseoj ktp.

La lernado dum la dua semajno ampleksiĝis per aŭskultado de fakprelegoj pri la gramatiko, literaturo, E-movado, historio kaj por kelkaj aldoniĝis metodiko, observado de la lecionoj por posta faka analizado, traktado de uzitaj metodoj, spertinterŝanĝo pri E-instruado kaj ĝenerale pri lingvoinstruado. Ne mankis rakontado, informado pri kulturaj eventoj, gravaj sciindaĵoj kaj por novaj kaj por jam spertaj esperantistoj.

La loko

Unikaĵo de tiu dusemajna kursaro estis, ke ĝi okazis en la E-Centro en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. La biblioteko de Interkultura

Centro Herzberg estis taŭga kursejo, ja abunda instrumaterialo, lernolibroj, vortaroj, facilaj legaĵoj kaj beletraj verkoj, gazetoj, sonmaterialoj kaj filmoj estis je dispono kaj por la instruistoj kaj por la kursanoj. La speciala kolektaĵo de pedagogiaj-metodikaj libroj, bone uzablaj lerniloj, surloke legeblaj, studeblaj verkoj multe helpis al ĉiuj por trovi taŭgajn helpilojn, legaĵojn, fakliteraturon.

(Surfote: SEP-kursanoj studas instrumaterialojn kaj helpilojn en la ICH-biblioteko)



La ĝardeno de ICH kun ombrodonaj arboj, mola herbejo kaj komforta pavilono montriĝis oazo dum la varmegaj someraj tagoj kaj servis kiel kunvenojo dum manĝopaŭzoj kaj bonetosaj amikaj vesperoj. La gastkuirejo, ĝardena rostadejo estis uzataj por komuna preparo de tagmanĝoj, al kiuj ĉiuj kontribuis kvazaŭ membroj de granda familio. Ĉar la Centro situas en la mezo de la urbo, estis facile atingeblaj la tranoktejoj, la vendejoj kaj aliaj servoj.

Programeroj

Kvankam la ĉefa celo dum la dusemajna kursaro estis la intensa lernado de Esperanto, ne povis manki aldonaj programeroj, kiuj tamen ankaŭ servis la instruadon. Dum urborigardado, ekskursoj al allogaj urboj, muzeoj kaj vizitindaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo la kursanoj aŭdis Esperanto-ĉiĉeronadon, legadis turismajn broŝurojn, dum vesperoj ili rigardis fotojn, E-filmojn, aŭskultis muzikon kaj lernis plurajn kantojn dum komuna kantado. Esperanto estis uzata dum individuaj aŭ grupaj libertempaj aktivaĵoj, sportado, naĝado; lernado estis ankaŭ la interŝanĝado de kuirreceptoj, instrukcioj por paperfaldado, manlaborado, komuna preparo de ĝardena pikniko kun gulaŝo.

Resumo: Sukcesa dusemajna lernado por lingva kaj movada perfektigo.

Zsófia KÓRÓDY,
<zsofia.korody@esperanto.de>

Instruado de Esperanto al infanoj en la „lando de la verda stelo”



La 20-an de Julio 2014 mi alvenis post sufiĉe longa vojaĝo per aviadilo, taksio kaj buso al la vilaĝo Ait Ouham. La vilaĝo estas la lasta en la Ait Bouguemez-valo (la „feliĉa valo”) en la Alta Atlaso-montaro de Maroko, kie loĝas homoj, kiuj ne estas araboj, sed amazirtoj, kies gepatra lingvo estas tamazirto. Tiam mi sciis nenion pri tio, kio atendis min, mi ne estis sukcesinta ekscii la nombron de la infanoj, iliajn aĝojn, la lokon, kie mi instruos.

La aventuro estis komenciĝinta multajn monatojn antaŭe, kiam eksstudentino – kies familio estas el tiu vilaĝo – diris al mi, ke ŝi kun sia edzo kreas asocion por helpi la infanojn tie. Ŝi opiniis, ke mi povus instrui la francan aŭ la anglan. Mi ŝatas vojaĝi al neturismaj lokoj, sed mi proponis instrui Esperanton. Post multaj demandoj (Instrui kion?... Lingvo el kiu lando?...Ĉu estas nova lingvo?...), ili konsentis.

Pri la aventuro mem, mi devas diri, ke en Ait Ouham vi certe povas trovi multajn infanojn (ĉiu familio havis 5, 10, eĉ 14 infanojn). Mi ankaŭ devas diri, ke fakte estis tro da infanoj. Mi akceptis ĉiujn infanojn la unuan semajnon: pli ol cent en tri grupoj laŭ la aĝoj, de 6- ĝis 14-jaraĝaj.

Post la unua semajno mi faris unu grupon el 23 infanoj. Mi elektis infanojn, kiuj estis sufiĉe lertaj por kompreni iomete pri vortfarado. Mi vere bedaŭras pri tio, sed mi tute ne povus sufiĉe bone instrui al beboj (kelkaj estis tre junaj, ili certe ne estis 6-jaraĝaj), al knabinoj, kiuj ne scipovis skribi eĉ sian nomon aŭ al tro grandaj grupoj.

Pri la knabinoj mi ŝatus iomete pli multe paroli. Multaj knabinoj forlasas la lernejon ĉe la fino de la sesa klaso (knaboj ne, ili iras al la meza lernejo, eĉ al la supera lernejo, laŭ Terminaro de ILEI), multaj knabinoj edziniĝas tre junaj. Kiam knabino forlasas la lernejon, ŝi laboras en la domo, helpas la patrinon, laboras en la kampo, alportas luzernon por la bovino, portas la bebon de la familio surdorse (mi vidis eĉ 7-jaraĝan knabinon kun sufiĉe peza bebo), alportas akvon de la rivero por trinki. Kiam junulino edziniĝas, ŝi transloĝiĝas al la domo de la gepatroj de la edzo (kiun fakte la gepatroj de la knabino estis elektintaj por ŝi) kaj faras la saman laboron tie kaj komencas novan familion.

Mi renkontis junulinon. Ŝi ŝajnis malpli ol 30-jaraĝa kaj havis 7 infanojn. Mi renkontis 96-jaraĝan viron. Li vivis kun sia tria edzino, ĉar la du aliaj estis mortintaj.

Dum mia unu-monata ĉeesto mi instruis Esperanton al tre inteligentaj knabinoj. Se iliaj gepatroj akceptus, ili povus loĝi en pensio apud la mezlernejo kaj daŭrigi la studadon. Mi esperas, ke ili havos tiun eblon!

Annie GRENTE (Francio), <anniegrente@hotmail.fr>

Reago

Kiel mezuri la gravecon de lingvo?

Malfacilas juĝi aŭ eĉ mezuri, kiom „grava”, „signifa”, „peza” aŭ „valora” estas lingvo. La kriterioj ĉiam dependas de tio, por kiuj homoj lingvo estas grava (ekz. la emocia rilato al la gepatra lingvo por multaj tre pezaj). Alia kriterio povas esti, por kiuj komunikaj funkcioj la lingvo servas (ekz. ĉu por faka komunikado aŭ nur por familia uzo ktp.), kian internacian statuson ĝi havas (ekz. ĉu valorus lerni la lingvon pro bezono de internaciaj kontaktoj) ktp. ktp.



En sia artikolo „Kiom internacia estas via vorto” Johan DERKS (IPR 1/13 kaj 1/14) i.a. diskutas la demandon, kiel difini la „pezon” de lingvo, ĝian „valoron” ktp.

Mi trovis iom da diskuto pri la graveco de lingvo, kiun ĝi havas/povas havi en *internaciaj rilatoj*, kian statuson ĝi havas aŭ havu.

Ulrich AMMON (1991b:242-254) mencias kelkajn kriteriojn por juĝi pri la graveco de difinita lingvo. Li mencias:

- *la kvanton de parolantoj*: la homoj, kiuj uzas la lingvon kiel gepatran aŭ kiel fremdlingvon
- *la socian karakteron de la lingvo*: socia karaktero de la parolantoj (ekz. aparteno al klasoj, tavoloj, sekso, sanstato ktp.), ekonomia kaj politika pezo aŭ signifo por regionoj kaj por interrilatoj
- *la funkciojn de la lingvo*: la uzo en diversaj medioj (ekz. instruobjekto, apliko por scienco kaj tekniko, lingvo de alloga kulturo k.s.)
- *la geografian distribuon*: ekz. loĝregiono de la gepatraj parolantoj, aliaj regionoj de la kvante signifa uzateco k.s.
- *la leĝan statuson de la lingvo*: ekz. deklarita nacia aŭ ŝtata lingvo de lando, lingvo de ŝtata grupo, de internaciaj organizaĵoj k.s.
- *la rilaton de la homoj al la lingvo*: emocia rilato, ŝato/malŝato de parolantoj kaj de neparolantoj.

Florian COULMAS (1993:9-25) aparte atentigas pri la ekonomiaj aspektoj de la valoro de lingvo. Li mencias kiel gravajn kriteriojn:

- *ĝian komunikan radiuson*: disvastiĝo kiel gepatra aŭ fremda lingvo
- *ĝian rolon kiel produktilo*: i.a. evoluinteco por beletraj, sciencaj, komercaj kaj aliaj funkcioj, do ĝia uzebleco laŭ lingva ellaboriteco
- *la tutan kvanton da investado en lingvon*: por teni (aŭ evoluigi) ĝin esprimipova kaj aplikebla laŭ la modernaj ŝanĝiĝantaj komunikbezonoj (i.a. kompilado de grandaj vortaroj ĝeneralaj kaj fakaj, instruiloj, elektronika aplikeblo, investoj por lingvo-kultivado k.s.)
- *la varvaloron de lingvo*: ekonomia forto de la lingvo-komunumo, la oferto de ekkonoj, tradukoj k.s. kaj la investo por la instruado/alproprigo eksterlande k.s.

De ambaŭ aŭtoroj kelkaj kriterioj tuŝiĝas aŭ interplektiĝas.

Gravas substreki, ke la kriterioj de ambaŭ aŭtoroj ne koncernas la strukturon de lingvo, ekz. kiom „internacia” estas lingvo. Tamen la strukturo de difinita lingvo povus influi ĝian malsaman kapablon esti terminologie preciza lingvo, (mal)facile lernebla kiel fremdlingvo, prilaborebla laŭ komputo-lingvistikaj kriterioj k.s.

Literaturo

Ammon, Ulrich (1991): The status of German and other languages in the European Community. En: Coulmas, Florian (1991, red.): A Language Policy for the European Community. Prospects and Quandaries. Berlin-New York: Mouton de Gruyter, [311 p.], p. 241-254

Coulmas, Florian (1993): Was ist die deutsche Sprache wert? En: Born, Joachim/Stickel, Gerhard (1993, red.): Deutsch als Verkehrssprache in Europa. (Institut für Deutsche Sprache. Jahrbuch 1992) Berlin-New York: Walter de Gruyter, [342 p.], p. 9-25.

Detlev BLANKE (Germanio), <detlev@blanke-info.de>

Kia estas bona instruisto?

(Laŭ prelego en Herzberg, Germanio, dum la 46a Konferenco de ILEI en Julio 2013)

Estas 3 facetoj. Jen ili:

Bona instruisto devas havi SCIOJN

Kompreneble oni povas trovi sciojn en libroj kaj en la reto, sed pli bone havi iom da stoko en la memoro. Devas esti adekvata distanco inter la scionivelo de la instruisto kaj tiu de la lernanto. Adekvata signifas ne tro malgranda kaj ne tro granda distanco.

Bona instruisto estu INTELIGENTA

Kie kuŝas tio? En la kapabloj analizi, sintezi, dedukti, kompari, resumi. Tio rilatas al intelektaj kapabloj.

Bona instruisto devas esti bona PEDAGOGO

1. Kapablo percepti la lernsituation, konsideri ĝin, adaptiĝi al ĝi.
2. Kapablo prepari kaj prezenti salteblajn paŝojn por ĉiuj lernantoj.
Didaktiko.

3. Kapablo konstrui varian kurson kun legado, skribado, aŭskultado, parolado, ekzercado, kantado, ludado, malkovro, en bona ekvilibro. Didaktiko.
 4. Kapablo paki la lernendajn paŝojn en amuzaj kaj maltedaj kursoj.
 5. Kapablo respondi al diversaj demandoj tamen GVIDI kiel kapitano, mastrumi.
 6. Kapablo respekti la lernantojn. Fini la programon, alveni akurate, aspekti dece...
 7. Kapablo klare kaj pozitive komuniki.
 8. Doni plenan atenton al la grupo. Ĉi tie kaj nun.
 9. Havi entuziasmon kaj karismon por tiri la lernantojn al sukceso (kresko de motiviĝo, konsekvence: lernado okazas)
 Nun imagu sencian homon pedagogie tre dotitan... .. inteligentan homon sen pedagogiaj kapabloj....
 ... inteligentan homon sen scioj...
- Ekzistas!!!

Diversaj rimarkoj

La tasko de la instruisto ne estas plaĉi al la lernantoj. Ĉiam kelkaj lernantoj ne ŝatas la personecon de la instruisto. La instruisto ne povas influ tiun.

Por la instruisto gravas kapablo adaptiĝi.

Bona instruisto devas esti mezbona aŭ tre bona en la 3 kampoj. Vidu pilotojn: ili ne povas esti geniaj en akrobata flugado kun mankoj en aliaj reagkapabloj. Temas pri giganta defio!!!

Ne eblas kopii elstaran instruiston. Ĉiu devas trovi sian stilon. La instrukapablo similas al ganto: granda viro ne povas uzi ganton de malgranda virino. Tamen spertointerŝanĝoj tre valoras.

Por reveni al nia temo: ni ĉiuj estas lernantoj, ni daŭre estas en lernado. Pri lingvoj oni neniam povas ĉion scii. Mi plurfoje monate lernas novajn vortojn en la franca, kiu estas mia denaska lingvo. Same pri instruado: neniam iu povas diri: nun mi instruas perfekte.

En „Faktoj kaj Fantazioj” de Marjorie BOULTON (aŭ el alia verko, mi ne plu memoras precize...) mi legis: tiu, kiu lernas per la instruado de „ĉionscianta” profesoro, similas al tiu, kiu trinkas verdan akvaĉon de stagnanta lageto; tiu, kiu lernas per la instruado de konstante esploranta profesoro, similas al tiu, kiu trinkas puran akvon de montara fonto.

Ĉu mia titolo povus esti „Kia estu bona instruisto?” Alivorte: ĉu eblas akiri tiajn facetojn? Certe eblas akiri sciojn. Certe eblas organizi siajn kursojn pli

efike. Certe eblas trejniĝi en klara kaj respekto plena komunikado. Tamen akiri karismon ne eblas. Kelkaj ecoj estas denaskaj.

Mireille GROSJEAN

(kun 38jara profesia sperto pri lingvoinstruado al 14-15jaraĝuloj)

E-instruado estas daŭripova en Ĉinio

Rektorino gastas en E-seminario kaj parolas pri E-instruado

Maje 2014 okazis la 5-a Seminario de E-Instruado en Changzhou, Ĉinio. Dongfang (Orienta) Elementa Lernejo gastigis la seminarion. Dum la seminario tre brilas la punkto, ke oni unuafoje invitis al Rektora Forumo. Kvar rektoroj, en kies lernejoj funkcias Esperanto-kurso, venis respektive el Pekino, Taiyuan (Shanxi-provinco), Zhenjiang (Jiangsu-provinco) kaj Changzhou (Jiangsu). La gerektoj faris prezentadon pri E-instruado kaj interŝanĝis, kiel promocioj E-instruadon en elementa lernejo. Profitante la okazon, raportisto faris intervjuon kun LIU Lixia, rektorino de la gastiganta lernejo Dongfang¹.

E-instruado en Dongfang Elementa Lernejo (mallongigo: Dongfang) havas bonan tradicion. Ekde la fondiĝo de Changzhou-a Esperanto-Asocio en 1984 Dongfang jam funkciigis Esperanto-kurson. Dum la pasintaj tridek jaroj ni semas la ideon pri paco, amikeco kaj amo inter lernantoj. Ni ĉasas por lernantoj gajan vivon kaj sanan kreskon.”

Tion diris LIU Lixia en sia prezidado por la seminario. LIU Lixia eklaboris kiel rektoro de Dongfang en 2007. Sed antaŭ tio, ŝi jam multe informiĝis pri la E-instruado. Ŝi transprenis la stafeton daŭrigi la bonan tradicion, kaj zorgeme flegas la laboron kiel gravan taskon. Ŝi diris, ke la 5-a Seminario de E-Instruado donas honoron kaj ŝancon por la lernejo Dongfang.

Menciinte la instruadon de Esperanto en Dongfang, oni nepre menciu la nomon TAKEUTI Yoŝikazu, la karmemora amiko estis prezidanto de la Japan-Ĉina Amikeca Asocio de la urbo Takatsuki, ankaŭ prezidanto de la urba Esperanto-Asocio kaj prezidanto de Komisiono por Azia Esperanto-Movado de UEA. En la jaro 1984 la Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia informis pri la fondiĝo de Changzhou-a Esperanto-Asocio.

¹ La raporton la ĉina E-radio elsendis en majo 2014, vd. <http://esperanto.cri.cn/>

TAKEUTI Yoŝikatsu, kiu estis serĉanta ŝancon amikiĝi kun ĉina urbo, kaptis la informon, kaj pere de la Radio ambaŭ kontaktiĝis. Dank' al klopodado de gesinjoroj TAKEUTI, la lernejo Dongfang kaj Changzhou respektive ĝemeliĝis kun Yusumi Elementa Lernejo kaj la urbo Takatsuki.

LIU Lixia opinias, ke la interfluoj kun japana Yusumi Elementa Lernejo grande akcelas la kvalitan edukadon en Dongfang. La ĝemeliĝo de ambaŭ lernejoj Dongfang kaj Yusumi larĝigas la horizonton de lernejoj. La lernejo akcentas la edukadon sciencajn kaj kulturajn. Pere de lernado de Esperanto lernantoj havigas al si fidon en lernado de la angla lingvo kaj aliflanke pli multajn ŝancojn elmontri sian talenton. Ŝi diris:

„Tio estas la stampo de Dongfang Elementa Lernejo. Ni postulas, ke ĉiuj lernejoj almenaŭ scipovu salutadon Esperante, kaj diplomitoj de Dongfang almenaŭ posedu la scion pri Esperanto”.

Tamen kiel rektoro de elementa lernejo LIU Lixia sentive tuŝis la problemojn ekzistantajn en baza eduko de elementa lernejo. Unue, laŭ ŝi, necesas disvolvi ankoraŭ pli vastan interŝanĝon inter instruistoj kaj lernejoj. La klasĉambro estu la unua sceno de interŝanĝo. Tial ŝi la unua decidis gastigi la seminarion pri E-instruado kaj Dongfang Elementa Lernejo estu la seminariejo.

Due, instruista trejnado estas grava garantio por daŭrigi la instruadon. LIU Lixia fiere prezentis junan instruist(in)on CHE Ye, kiu prenis la taskon lerni Esperanton tuj post eklaboro en Dongfang antaŭ tri jaroj. Post unumonata lernado ŝi eklernigis Esperanton. Laŭ ŝi la instruado progresigis ŝian lernadon. Ŝia instruado estas karakteriza. En la seminario ŝia demonstra instruado estis laŭdata.

LIU Lixia tre ĝojas, ke la seminario venigis instruist(in)ojn de aliaj tri lernejoj kun la rektoroj. Ŝi diris, ke la rektoroj el diversaj lokoj havas la saman idealon kun granda fido. Ŝi kredas, ke la interŝanĝo favoras la daŭrigon de E-instruado en ĉies lernejo. Ŝi esperas, ke E-instruado etendiĝos en ankoraŭ pli multajn elementajn lernejojn de Ĉinio.

En la jaro 2004, Dongfang estis juĝita kiel eksperimenta lernejo por instrui Esperanton, kaj en la jaro 2009 ĝi fariĝis elstara lernejo por demonstra instruado de Esperanto. Plie CHE Ye, laŭ konigo de LIU Lixia, estis elektita kiel vicsekretario de Ĉina Junulara Esperanto-Ligo.

Estante edukisto, LIU Lixia ne haltis en la jam akirita atingo, ŝia rigardo prudente direktiĝas al konkretaj aferoj. Ŝi esperas, ke oni laŭeble plej frue aperigos novan lernolibron, kiu taŭgu por (ĉinaj) elementaj lernantoj, tiel ke oni havu la taksajn normojn por juĝi la instruadon kaj plue establu kompletan sistemon por la kursoj. Ŝia opinio, se nur strukturiĝas la instruado kaj la juĝaj normoj, oni povus fari ankoraŭ profundan interŝanĝon. Krome, ŝi esperas, ke estos ŝtata kriterio taksi la instruadon, tio estos la beno al instruistoj kaj ankaŭ al lernantoj.

Nun en Changzhou E-instruado jam disvastiĝas en iuj mezlernejoj kaj superaj profesiaj lernejoj. LIU Lixia tre kontentas pri tio, opiniante, ke Esperanto-instruado estas daŭripova en Ĉinio.

YU Jianchao (Ĉinio), <skzjyujianchao@sina.cn>

Bruselo: oficiale dulingva urbo, reale multlingva urbo

En la Libera Universitato Bruselo, kie mi instruas, ekzistas tre interesa esplorcentro, kiu sekvas kaj analizas la lingvouzadon en Bruselo, oficiale dulingva urbo kun la lingvoj nederlanda kaj franca. Ĝi nomiĝas Brio aŭ Brusela Inform- kaj Esplorcentro. (www.briobrusel.be)

Ĝis la jaro 1947 oni kalkulis la loĝantojn en Bruselo laŭ gepatra lingvo sed tio ekde ĉi tiu jaro ne plu okazas pro politikaj kialoj. La rilatoj inter la du lingvokomunumoj estas tro sentemaj. La esplorcentro, kiu nun ekzistas 15 jarojn, volas pere de sciencaj esploroj plenigi tiun lakunon, sed neniel intencas fari politikajn konkludojn. Ĝi jam tri fojojn enketis ĉe bruselanoj pri lingvokono, lingvouzo kaj identeco. Tiuj enketoj donas ankaŭ multe da informoj pri la lingva situacio en lernejoj en Bruselo. El la enketoj rezultas „lingvobarometro”. Antaŭ kelkaj monatoj publikiĝis la rezultoj de la tria lingvobarometro, pri kiu mi poste rakontos.

Politike Bruselo estas urbo kun nederlandlingva kaj franclingva komunumaj socioj. Reale vivas en Bruselo 85% ĝis 90% franclingvanoj. SED la lingva fono de la loĝantoj ne ĉiam decidas, al kiuj lernejoj oni sendas siajn infanojn, ĉu al franclingvaj, ĉu al nederlandlingvaj. Multaj franclingvanoj sendas siajn infanojn al nederlandlingvaj lernejoj pro la ŝajne pli alta instrunivelo de fremdaj lingvoj kaj pro la fakto, ke ili volas, ke iliaj infanoj estu dulingvaj en la profesia vivo poste. La sekvo estas, ke

multaj bruselanoj ne plu apartenas nur al unu lingvokomunumo en la ĉefurbo de Belgio.

En tiu kunteksto ni devas esplori la lingvokonon de la bruselanoj: la instruado okazas nur en la nederlanda aŭ en la franca lingvoj, la angla estas lingvo, kiun oni lernas en la lernejo kaj uzas ankaŭ ekster la lernejo. La kvara grupo estas la lingvoj de la enmigrintoj, kiujn oni ĉefe parolas hejme. En la lernejo oni povas ankaŭ studi kelkajn aliajn okcidentajn lingvojn, kiel ekzemple la germanan aŭ hispanan.

La 21an de Junio 2013 estis komuniko en la gazeto „*Metro*”, ke lernejanaj povos estonte ankaŭ oficiale studi la araban, la turkan kaj aliajn vivantajn lingvojn en la mezgrada lernejo („meza lernejo” laŭ *Terminaro* de ILEI) en Flandrio kaj Bruselo. Tiu anonco venis subite de la flandra ministro pri edukado kun ĝis nun malmulte da klarigoj.

Laŭ artikolo en la flandra gazeto „*La Lasta Novaĵo*” (Het Laatste Nieuws) de la 20a de marto 2013 17,9% de la bruselanoj uzas la araban en Bruselo. Ĝi okupas la kvaran lokon post la franca (88,5%), la angla (29,7%) kaj la nederlanda (23,1%).

Nur 33,6%, do unu triono de la loĝantaro, uzas la francan hejme kiel nuran lingvon.

La tria barometro montras ĉefurbon, kiu ĉefe estas kosmopolita kaj ne tiom dulingva, kiel oni ĝin vidas en Flandrio kaj Valonio, la du aliaj regionoj de Belgio. Fonto: gazeto „*Bruselo ĉi-semajne*” de 21 Marto 2013 (Brussel deze week).

Pro la grava rolo de la nederlandlingvaj lernejoj la uzo de la nederlanda lingvo en la ĉefurbo restas konstanta. Flandrio uzas grandajn financajn rimedojn por subteni tiujn lernejojn, ĉar Bruselo estas ankaŭ la ĉefurbo de Flandrio.

La enmigrintoj ne tiom draste elektas nur la francan lingvon kiel komuniklingvon en Bruselo. Oni povus diri, ke ili elektas ankaŭ la nederlandan aŭ internaciajn lingvojn kiel ĉefe la anglan. Ili do internaciigas nian ĉefurbon.

Se la nederlanda estas unu el la hejmlingvoj en la familio, la infanoj iras al nederlandlingvaj lernejoj tiel, ke en la venonta generacio la nederlanda lingvo plej verŝajne ne malaperos.

En nederlandlingvaj lernejoj oni pli bone lernas la anglan kaj la nederlandan ol en franclingvaj lernejoj. En tiuj lastaj oni malbone lernas la anglan kaj la nederlandan kun alta senlaboreco inter gejunuloj kiel sekvo. Tio almenaŭ estas la opinio de la partoprenintoj al la enketoj.

Oni povas konkludi, ke en Bruselo ekzistas du grandaj grupoj: unu grupo (30%) parolas hejme la francan, iras al franclingva lernejo, laboras en la franca kaj uzas franclingvajn amaskomunikilojn. Ili ofte iom negative rilatas al Flandrio.

La alia grupo estas tre malhomogena, parolas plurajn lingvojn, konsultas informojn en diverslingvaj medioj kaj ne apartenas al iu difinita lingvogrupo.

La nederlandlingvaj bruselanoj ne povas findecidi, ĉu ili estas flandraj bruselanoj aŭ bruselaj flandroj. Ofte ili preferas la difinon de „nederlandlingva bruselano” kiel identecon, ĉar la vorto flandra/Flandrio havas malbonan reputacion en la nuna Bruselo pro flandremaj partioj en Flandrio.

Belgaj lernejoj havas tre striktan lingvoregularon, ĉefe la nederlandlingvaj en Bruselo, kie oni daŭre timas tro da influo de la franca lingvo. Sed pro la eksterlerneja situacio bruselaj lernejoj bezonas urĝe plurlingvan instruadon. La strikta divido inter la nederlanda kaj la franca, kaŭzita de la subvenciado de la ministerioj pri edukado de ambaŭ komunumoj, ne plu estas aktuala en Bruselo. Oni devus diskuti, kiumaniere aŭ kiudirekte la instruado en la lernejoj povus evolui. Oni povus jam komenci en la infanlernejo („antaŭlernejo” laŭ *Terminaro* de ILEI) kun plurlingva instruado, kiel pruvas jam kelkaj privataj eksperimentoj en Bruselo. Taŭgaj solvoj estas komplikaj, ĉar neniam antaŭe tia situacio ekzistis. Sed se eksterlernejaj vivkondiĉoj evoluas, la instruado devas sekvi. La flandra ministro pri edukado, Pascal Smet, defendas la ideon de pli ofta uzo de la angla lingvo kun pli intensa instruado en ĉiuj bruselaj lernejoj.

En Bruselo pli ol en aliaj urboj en Belgio la lernejoj konsistas el lernejoj kun malsamaj gepatraj lingvoj. Tio estas grava defio por adekvata instruado de fremdaj lingvoj. Multaj respondintoj de la lasta enketilo de la esplorcentro *Brio* vidas dulingvan instruadon kiel necesan rimedon en Bruselo, por interalie malpligrandigi la senlaborecon inter gejunuloj, kiu atingas en Bruselo 35%. La eŭropa averaĝa procentaĵo estas

17%. La manko de lingvokono kompreneble ne estas la nura kialo por tiu alta cifero, sed ĝi estas esenca parto de la problemo. Konstatebla en Bruselo estas la granda sukceso de lingvokursoj en la nederlanda lingvo, ĉar homoj esperas je laborloko en la apuda Flandrio, kie kelkloke estas pli da liberaj laborlokoj ol en Bruselo.

Jam ekzistas fakte plurlingvaj lernejoj en Bruselo: la eŭropaj lernejoj por infanoj de EU-oficistoj kaj aliaj eksterlandaj laboruloj. Tiuj lernejoj estas tre multekostaj. Oni devas atenti, ke eventualaj eksperimentoj kun plurlingveco en belgaj lernejoj ne estu same multekostaj kaj sekve pageblaj nur por riĉaj bruselanoj, kiuj pro sia edukiteco vidas pli klare la neceson de tiaj eksperimentoj ol averaĝa familio de ekzemple enmigrintoj.

Konklude oni povas diri, ke ŝanĝi la leĝojn de instrulingvoj en Bruselo estos tre malfacila proceso, sed ĝi estas necesa:

– La nederlandan oni devus ankoraŭ pli bone instrui al nenederlandlingvanoj, por ke ili povu poste vere funkcii kaj labori en tiu lingvo.

– La kono de la franca restas necesa por nederlandlingvaj kaj aliaj bruselanoj, ĉar ĝi estas la ĉefa komunikolingvo en Bruselo.



– La angla tre gravas en lerneja instruado pro sia rolo en la mondo kaj en internaciaj organizoj. Eble ĝi eĉ fariĝos la komunikolingvo inter Flandrio kaj Valonio estonte, kiam ambaŭ lingvokomunumoj ne plu konos la lingvon unu de la alia.

– Kio okazos kun la kono/instruado de aliaj (vivantaj) lingvoj en lernejoj? Tio estas ne konata faktoro, ĉar la flandra ministro pri edukado ĵus decidis pri ebloj studi ilin, sed nenion klarigis poste.

Kristin TYTGAT, <kristin.tytgat@ehb.be>

NdlR: Tiu ĉi teksto estis prelego dum la Tago de la Lernejo en la UK en Rejkjaviko en Julio 2013. Kristin TYTGAT instruas lingvojn al tradukistoj kaj interpretistoj en la Libera Universitato Bruselo.

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

Plian fojon okazis en Kantono kurso de E-o de la 15-a de Marto ĝis la 28-a de Junio gvidata de s-ro Aŭgusto CASQUERO, volontulo el Hispanio. Dek kvar novaj kaj malnovaj lernantoj de E-o partoprenis la ceremonion por la disdonado de partoprenatestiloj. Ankaŭ s-ro Peixue „Petro” YE, vicprezidanto de la E-Asocioj de Kantono kaj Guangdong-Provinco, ĉeestis la ceremonion.

Poste la ĉeestantoj kunmanĝis por ĝoje diri „ĝis revido” al la estimata amiko Aŭgusto, ĉar li iras al Hispanio por somera feriado kaj revenos al Kantono en Septembro.

Raportas: YE Peixue, <peterye@163.com>



Finnlando

Fabela kurso en Finnlando



Kolektiĝis dek unu esperantistoj en julio en Orivesi en Finnlando por refreŝigi sian parolkapablon. Ni travivis la kvin fabeltemajn tagojn sub gvidado de Graĵina OPULSKIENĖ, kiu venas el Litovio. Ankaŭ plenkreskuloj, kaj ne nur infanoj, bezonas fabelojn, diras esploristoj, kaj tion ni spertis. Ni ĝuis multajn konatajn kaj nekonatajn rakontojn, mem legante aŭ aŭskultante la rakontadon de aliaj partoprenantoj. Ni lernis pri famaj fabelistoj, inter kiuj Graĵina intence aldonis Tove JANSSON por la sekva prezento de la programo. Estis bone, ke ni lernis novajn nomojn de bestoj aŭ floroj.

Ekster la fabela temo ni aŭdis de ŝi pri Zamenhof en Litovio. Grazina instruis, kiel japanece bele paki aĵojn per tukoj kaj ne per papera kovraĵo, kiel ni faras. Ne temis nur pri belaj pakajoj, sed per helpo de tuko ni lernis, kiel porti melonon, botelojn aŭ poton. Eĉ dorsosako kreigiĝis el du tukoj. Tiu lasta programo estis tre ŝatata, ĉar ni povis ankaŭ labori, uzi niajn manojn. Ni ekskursis al la artcentro Purnu tra belaj Mez-Finnaj pejzaĝoj el kampoj, arbaroj, kurbaj vojoj. La artcentro situas ĉe ĉarma lago tiel, ke multaj el ni pli ŝatis la pejzaĝon tie ol la modernajn artaĵojn. La kurso kuraĝigis nin uzi la parolan lingvokapablon, ne nur la skrib- aŭ legkapablon.

Sylvia HÄMÄLÄINEN, <sylvia.h@kolumbus.fi>

Germanio

TORPEDO 9 inter 2 kaj 5 oktobro 2014

La ĉeftemo de la ĉi-jara pedagogia-metodika kunveno: Kiel utiligi fotojn kaj filmojn por efika instruado? Lerne pri ĝi en la praktiko, ekkonu taŭgajn materialojn, metodojn kaj partoprenu publikan Esperanto-filmeventon en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Organizanto: Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI). Aliĝo ĉe zsofia.korody@esperanto.de. Reta aliĝilo: <http://ic-herzberg.de/page.php?pid=94466511>.

Adreso: Interkultura Centro Herzberg, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

Partoprenkotizo por AGEI kaj ILEI-membroj 30 EUR, por aliaj 40.

Hungario



KÖNCZÖL Ernő, instruisto de Esperanto en la nord-hungara urbo Eger, forpasis la 29an de junio 2014. Ernő konatiĝis kun Esperanto en 1970 kaj fariĝis entuziasma, sindona adepto. Ekde 1971 li estis membro de HEA; ekde 1973 de UEA, kaj inter 1980-2008 kiel prezidanto gvidis la grupon Verda Stelo. Li emeritiĝis en 1994 kiel mezlerneja fremdlingvo-instruisto. Ernő estis longtempa membro de la hungara sekcio de ILEI kaj liaj gelernantoj sukcese partoprenis la diversajn landajn konkursojn. Dio donu al li ripozon!

OOSTENDE INVITAS:

LA 48-A KONFERENCO DE ILEI

17-25 JULIO 2015



**ILEI-konferenceto 2015:
Junulargastejo "De Ploate"**

Plateso estas marfiŝo el atlantikaj profundoj, ŝate vidata sur pladoj de atlantikkbordaj kuirkulturoj. Ne hazarde ĝi pruntis la nomon al la populara kaj komforta junulargastejo „De Ploate” („Plateso” en la flandra dialekto) en Ostendo (Oostende), Belgio. Kaj ne hazarde estis elektitaj: Ostendo por la konferencurbo kaj „De Ploate” por konferenceto kaj loĝejo de la 48a Konferenco de ILEI, 17-25 julio 2015, semajnon antaŭ la 100a UK okazonta en la proksima Lillo (Lille), Francio.

Du simbolaj 100-oj fonas la jaran ĉefeventon de ILEI en 2015: la ĉi-jara 100a datreveno de la komenco de la Granda Milito, kaj la venontjara 100a UK. La unua inspiras, ke la konferenca temo rilatu al konstruado kaj gardado de paco post la grandaj militoj, kaj la dua motivas ILEI donisian kontribuon al cerebro de la grava movada jubileo.

Ostendo kaj la ĉirkaŭa regiono konservas memorojn kaj vidobligas memorajn pri historiaj eventoj el la Unua Mondmilito, kiuj lasis



La urbestro de Ostendo, staranta dua de maldekstre, kun konferencorganizantoj de ILEI

neviŝeblajn spurojn en la vivo de ĉi tiu havenurbo, tra kiu dum jarcentoj trafikis homoj, varoj kaj ideoj el la tuta mondo. La ostenda lumturo kun la packolombo portanta en la beko la verdan stelon de esperantista pacespero radias el la proponata konferenca emblemo per la komunaj streboj al daŭripova paco 100 jarojn post la Unua kaj 70 jarojn post la Dua Mondmilitoj, kaj post ĉiuj aliaj militoj. Precipe la ILEI-simpoziaj diskutoj enkadre de la konferenco estos dediĉitaj al ĉi-koneksa temaro. La konferencaj ekskursoj gvidos konferencanojn al la Palacio de princo Karel, Atlantika Muro, Fortikaĵo de Napoleono, vidindaĵoj el la Unua Mondmilito, brusela ekspozicio de EU en 23 lingvoj kaj aliaj historiaj monumentoj kaj kulturaj vidindaĵoj en Okcidenta Flandrio, Antverpeno kaj Bruselo. La urbestro de Ostendo certigas subtenon al la konferenco, interalie monan apogon al nepagipovaj konferencanoj el malriĉaj landoj.



La proksimeco de Lille, la samjara kongresurbo de UEA, ebligas komfortan trajnveturan transiron al la jubilea UK kun la konferencaj konkludoj kaj inspiroj kiel labora kaj celebra kontribuo.

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj



Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Mireille Grosjean, Leysester Miro, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Tiekó Isikawa, Ana Montesinos de Gomis.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi. Estrare: Penny Vos.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Bharat Ghimire, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”..

Enmovadaj partneroj (entute 14)

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola**

Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*.

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj

Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.

Retadreso: *redaktanto@edukado.net*.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49)55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de*.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio)

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Petra Smidélus**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*.

Reprezentanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI:

Stefan MacGill.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIFLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek**, **Ron Glossop**, **Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. **Kun aliro nur al reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona kaj 70 € por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <moerbeek@gmail.com>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo la 11-an de septembro 2014, redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2014.

Juna Amiko pretas veni al vi.
Invitu ĝin! Abonu!



Grupa foto de konferencanoj en Montevideo (foto de Marija Belošević)



ILEI plantas arbojn. Jen la gujavarbo antaŭ la parlamenta palaco en Montevideo. Sidas apud ĝi Alberto Barrocas kaj lia edzino Helianta. Li lernis E-on en 1954 post la eventoj kaj pro la eventoj en sia urbo. (foto de Marija Belošević)

